# 104-a Universala Kongreso de Esperanto

Lahtio, 20 – 27 julio 2019

# DUA BULTENO



KONGRESA TEMO

**Vivanta naturo, floranta kulturo**

# Enhavo

Bonvenon al la kongreslando ........ 2
La kongresejoj ........ 3
Utilaj informoj pri Finnlando kaj Lahtio ........ 4
Provizora programo ........ 5
Kiel mendi servojn? ........ 6
Lingvaj kursoj ........ 7
Hoteloj ........ 8
Ekskursoj ........ 11
Antaŭkongresaj ekskursoj ........ 12
Postkongresaj ekskursoj ........ 14
Ekskursoj dum la kongresa semajno ........ 16
Tuttagaj ekskursoj ........ 16
Duontagaj ekskursoj ........ 18
Tabelo de dumkongresaj ekskursoj ........ 20
Bankedo ........ 21
Aranĝoj ĉirkaŭ la UK ........ 22
Pliaj informoj ........ 22
Kontaktinformoj ........ 23

# Loka Kongresa Komitato

| | |
|---|---|
| Prezidanto | Tuomo Grundström |
| Vicprezidanto, kongresejo | Päivi Saarinen |
| Ĝenerala sekretario, volontuloj | Tiina Kosunen |
| Ekskursoj | Tiina Oittinen |
| Arta kunordiganto, kasisto | Paula Niinikorpi |
| Informado | Jukka Pietiläinen |
| Junulara programo, reta informado | Larissa Phileas |
| Blindulaj aferoj | Börje Eriksson |
| Urbaj rilatoj | Synnöve Mynttinen |
| Infana Kongreseto | Sigrid Kivistö |

Redaktado: Clay Magalhães
Grafiko, kovrila foto (lahtia skisaltejo): Francisco L. Veuthey
Provlegado: Rob Moerbeek kaj Ionel Oneţ
Ilustraĵoj: p. 1 (emblemo) Börje Eriksson; p. 2 Pixabay/596770; p. 3 (maldekstra) Wikiwand.com, (dekstra) Pelikans.fi; p. 4 Kallioniemi, Päätalo, Taivalkoski; p. 6 Pixabay/IK3; p. 7 Freepik; p. 10 (mapo) Visit Lahti; p. 12 Shutterstock/15474117-e1524396676710; p. 13 Wikimedia Commons/Florstein; p. 14 Pixabay/Jackmac34; p. 15 Dutchbaby; p. 16 (supre) Moomimailma Oy, (sube) Visit Lahti; p. 17 (supre) Toni Honko, (sube) Pixabay P1160553; p. 18 (maldeks.) Wikipedia/Ojp/CC-BY-SA-2,5, (deks.) Wzmofim.com; (sube) Visit Lahti; p. 19 (maldeks.) Pixabay/Ulleo, (deks.) kompleze de Timo Väänänen; p. 20 Visit Lahti; p. 21 Pixabay/Perronjeremie; p. 24 Freepik/Asierramero.

104-a Universala Kongreso de Esperanto

Lahtio, 20 – 27 julio 2019

# DUA BULTENO

KONGRESA TEMO

## Vivanta naturo, floranta kulturo

# Bonvenon al la kongreslando



## Ĝenerale

Bonvolu noti, ke la reguloj pri vizdonado malsamas laŭ landoj kaj ke ili ofte ŝanĝiĝas. Tial bv. nepre mem kontroli ĉe la plej proksima diplomatia reprezentejo de Finnlando (bv. mem trovi ĝian adreson en via ĉefurbo aŭ najbara lando), ĉu vi bezonas vizon kaj sub kiuj kondiĉoj.

CO/LKK ne povos helpi pri vizpetoj faritaj post la 1-a de majo 2019 kaj principe ne povos respondi al tiuj petoj.

## Dokumentoj

Ĉiu vizitanto devas havi validan identigilon kaj tiuj de landoj ekster la Schengen-areo devas havi pasporton validan minimume tri monatojn post la forirdato, koncernajn vizon kaj asekurojn, samkiel revenbileton. La kongresanoj mem devas zorgi pri akiro de vizoj. En escepte komplikaj kazoj UEA/LKK povas helpi.

## Konfirmiloj kaj invitleteroj

Normale la Kongresa Konfirmilo devas sufiĉi por pruvi la kongresanecon al la vizdona instanco. La konsulejoj povas postuli oficialan invitleteron, kiun la CO sendos se oni petos ĝin. Al nealiĝintoj oni ne povas sendi invitleteron nek aliajn konfirmaĵojn. Bonvolu konscii, ke nek la CO nek LKK povas influi la decidojn de la konsulejoj.

## Datoj

Bv. noti, ke la invitletero povas teksti nur por la periodo de la oficiala kongresdaŭro (20-a ĝis 27-a de julio, eventuale plus la daŭro de menditaj antaŭ- kaj/aŭ postkongresoj). Se vi bezonas pli longan restadon, tion vi devas aranĝi private.

## Mongarantioj kaj asekuroj

Senkonsidere ĉu oni havas aŭ ne la vizon (depende de la civitaneco), necesas pruvi ĉe la eniro en la landon, ke oni posedas sufiĉajn monrimedojn por la restado. Al kongresanoj, kiuj mendis kaj pagis loĝadon pere de UEA (aŭ venas je aparta invito de UEA), oni povas sendi, laŭ peto, konfirmon pri la pagitaj servoj. Tio povas parte kompensi la postulon pri posedo de sufiĉaj monrimedoj. UEA kaj LKK ne donas financajn garantiojn al kongresanoj. Kongresano mem devas pruvi al la vizdona instanco posedon de sufiĉaj rimedoj por restado en la kongresa lando. Unu el la postuloj por ricevi vizon estas akiro de vojaĝasekuro kiu inkluzivas eventualajn santraktadojn kaj repagojn kaze de akcidentoj. La kongresanoj zorgu mem akiri tiujn asekurojn.

Sendepende de tio, ĉu necesas havi vizon aŭ ne, ĉiu kongresano prefere asekuru sin por la tuta daŭro de la vojaĝo kaj restado, inkluzive por eventuala nuligo de partopreno en la kongreso.

## Alveno al Lahtio kaj al la kongresejo

Helsinko kaj ĝia internacia flughaveno, Helsinki-Vantaa (HEL) troviĝas je proksimume 1h30 de Lahtio (la veturdaŭro varias depende de la transportilo elektita, konektotempo, trafiko). De la flughaveno eblas atingi Lahtion per trajno (unue la linio P ĝis la stacio Tikkurila kaj tie ŝanĝi al la linio Z ĝis Lahtio – biletoj aĉeteblas ĉe https://www.vr.fi/cs/vr/en/frontpage kaj ĉe la verdaj aŭtomatoj en la flughaveno), buso (biletojn oni aĉetas en la retejo https://matkahuolto.fi/en/ aŭ rekte de la ŝoforo) kaj aŭtomobile/taksie.

La busa/trajna stacidomo de Lahtio situas 1,3 km for de la kongresejo. Bv. iri unue al via hotelo kaj nur poste al la kongresejo. Pro la distanco al la hoteloj povas esti pli rapide kaj facile atingi la kongresejon piede/bicikle ol per la urbaj busoj. Al homoj kun marŝoproblemoj ni rekomendas preni taksion.

# La kongresejoj

La ĉefa kongresejo estas Isku Areena, Svinhufvudinkatu 29, FI-15110 Lahti. Kunsidoj okazos ankaŭ en la lernejo Salpaus, je 300 m de la areno.

Bv. ne skribi al la kongresejo sed nur al la konstanta adreso de UEA en Roterdamo.








# Utilaj informoj pri Finnlando kaj Lahtio

## Situo

Finnlando situas en la norda Eŭropo kaj limas kun Svedio nordokcidente, Norvegio norde, Rusio oriente kaj Balta Maro sude kaj okcidente. Lahtio (120 000 loĝantoj), konata pro vintraj sporteventoj kaj pro sia internacie renoma simfonia orkestro, estas la ĉefurbo de la provinco Päijänne-Tavastia (200 000 loĝantoj); ĝi situas en la suda Finnlando, je 100 km norde de Helsinko. En somero la temperaturo en la sudo de Finnlando varias inter 15 kaj 25 gradoj Celsiaj kaj foje pluvas.

## Lingvoj

La oficialaj lingvoj estas la finna kaj sveda. En multaj lokoj eblas komuniki ankaŭ per la angla, germana kaj rusa.

## Loka tempo

UTC + 03h00 (somere).

## Mono

La loka mono estas eŭro. Moneroj: 1, 2, 5, 10, 20, 50 cendoj kaj 1 kaj 2 eŭroj. Biletoj: 5, 10, 20, 50, 100, 200, 500. Eblas pagi per moneroj de 1 kaj 2 cendoj sed oni ne ricevas ilin kiel redonmonon. Kontante, la pagota sumo rondiĝas (+/-) al la plej proksimaj 5 cendoj. Eblas ŝanĝi monon precipe en la flughavenoj kaj bankoj. Monmaŝinoj (ATM) troviĝas en multaj lokoj. Preskaŭ ĉiuj vendejoj, restoracioj kaj hoteloj akceptas debet-/kreditkartojn.

## Trinkmono

En Finnlando trinkmono estas aprezata sed ne atendata.

## Medikamentoj

Se vi uzas preskribitan medikamenton, bv. kunporti la kuracistan recepton skribitan per latinaj literoj.

### Sanservo

Estas konsilinde ke kongresanoj havu sanasekuron por la daŭro de la vojaĝoj plus restado. UEA ne respondecas pri asekuro de kongresanoj.

### Trinkakvo

La kranakvo estas trinkebla.

### Elektro

La tensio estas 220-volta. La surmuraj konektilingoj estas rondaj dupolusaj.

### Telefonado

La prefikso por telefoni al Finnlando de eksterlando estas +358 (sen la komenca nulo de la numero). Por telefoni de Finnlando al eksterlando: 00 + landa kodo + telefonnumero. Grava numero: 112 por polico, savobrigado kaj urĝa medicina helpo.

### Interreto

En pluraj hoteloj, restoracioj, kafejoj ktp troveblas senpagaj retkonektoj.

### Sekureco

Finnlando estas ĝenerale tre sekura lando, sed, kiel ĉie, estu atentema pri dokumentoj, valoraĵoj, mono ktp.

# Provizora programo

Jen la plej gravaj programeroj. La Estraro de UEA rezervas al si la rajton fari ŝanĝojn.

**Sabato, 20 julio**. Malfermo de la kongresejo je 9h00. Registriĝo. Disdonado de dokumentoj. Komitato de UEA. Unuafojaj Kongresanoj. Libroservo. Movada Foiro. Giĉetoj funkcias ĝis 18h00.

**Dimanĉo, 21 julio**. Solena Inaŭguro (10h00). Libroservo. Inaŭguro de IKU/AIS. Kongresa Temo. E-kursoj. Finna Eksprese. Nacia Vespero.

**Lundo, 22 julio**. Libroservo. Kleriga Lundo. IKU-prelegoj. Komitato de UEA. E-kursoj. Finna Eksprese. Bankedo. Kongresa Balo.

**Mardo, 23 julio**. Libroservo. E-kursoj. Tago de Lernado. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Estraro sinprezentas. Finna Eksprese. Delegita Reto. Societo Zamenhof. Teatro.

**Merkredo, 24 julio**. Tuttagaj ekskursoj. Kongresejo fermita.

**Ĵaŭdo, 25 julio**. Libroservo. Libroj de la Jaro. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Esperantologia Konferenco. Belartaj Konkursoj. Finna Ekspreses. E-kursoj. Centra Oficejo respondas. Konkurso pri Publika Parolado. Urba Akcepto (por invititoj). Koncerto.

**Vendredo, 26 julio**. Libroservo. Komitato de UEA. IKU-prelegoj. KER-ekzamenoj. Faka Forumo. Aŭkcio. Piedpilka matĉo. Prezento pri la venontaj Universalaj Kongresoj. Internacia Arta Vespero.

**Sabato, 27 julio**. Solena Fermo (10h00). Libroservo (ĝis 14h00). Fermo de la kongresejo (14h00).



# Kiel mendi servojn?

## Ĝeneralaj kondiĉoj de mendado

La kondiĉoj de mendoj kaj malmendoj estas priskribitaj dorsflanke de la mendilo kaj en la Dua Bulteno. Mendante, ĉiu kongresano akceptas tiujn kondiĉojn. Bonvolu nepre legi ilin antaŭ ol plenigi kaj sendi vian mendilon.

## Loĝado

Kiel unuan loĝdaton oni kalkulas la daton de la alveno al la hotelo (ekloĝo); se oni venas iam post noktomezo, kalkuliĝas la dato de la antaŭa tago. La forirdato estas la dato kiam oni forlasas la hotelon (la dato de la efektiva foriro).

## Eniro kaj eliro

Principe eblas okupi ĉambron ekde la 15h00 de la mendita dato; necesas forlasi ĝin ĝis la 12h00 de la lasta tago. Se vi ne okupas ĝin dum la unua mendita tago, oni nuligas la rezervon kaj vi perdas la plenan sumon por la tuta restadperiodo!

## Dulitaj ĉambroj/hazarda kunloĝigo

La loĝiga servo ne povas aranĝi hazardan kunloĝigon de nekonatoj, pro kio du- kaj plurlitajn ĉambrojn oni disponigas nur al homoj kiuj anticipe interkonsentis pri kunloĝado kaj menciis tion sur siaj mendiloj. Oni ĉiam fakturas la koston de plena ĉambro, eĉ se la kunloĝanto forestas dum iu(j) tago(j). Por faciligi la trovon de kunloĝanto(j), en la reta mendilo (http://uea.org/kongresoj/mendilo) disponeblas anonctabulo.

## Frueco de la mendo kaj alternativoj

Ĉar la mendeblaj kapacitoj ne estas senlimaj kaj precipe ĉar la kongreso okazas dum la turisma sezono, gravas mendi kiel eble plej frue. Tial nepre ĉe ĉiu mendo oni menciu ankaŭ alternativajn loĝvariantojn. El la reta mendilo eblas scii, kiuj hoteloj ankoraŭ havas liberajn lokojn.

## Loĝkonfirmo

Minimume unu monaton antaŭ la UK vi ricevos konfirmon pri via loĝado, kun detalaj informoj pri viaj mendoj.

## Ekskursoj

Atente traleginte la priskribojn bv. elekti la servon kaj plenigi klare (preslitere) la koncernan parton de la mendilo.

Ĉiuj ekskursoj startas de la kongresejo, krom se alie indikite (ĉu en la ekskursa priskribo, ĉu sur la ekskursa bileto). Klopodu veni dek kvin minutojn antaŭ la indikita starthoro de la ekskurso. Ĉiujn ekskursojn akompanos Esperantlingvaj gvidantoj. Ili ne estas profesiaj ĉiĉeronoj sed nur bonvolaj helpantoj. Bv. indulgi ilin per pacienco kaj samideana komprenemo. Ili faros sian plejeblon por bone servi al vi.

Kun la kongresaj dokumentoj ĉiuj mendintoj ricevos la biletojn de la menditaj ekskursoj kun la bazaj informoj pri ili (dato, horo, buso), kiuj eventuale povos malsami ol tiuj presitaj en la Dua Bulteno. Okaze de malsameco validas la informoj presitaj sur la biletoj.

Ne forgesu preni ŝirmilon kontraŭ suno, vento kaj eventuale pluvo. Bv. noti, ke kelkaj ekskursoj povas esti netaŭgaj por homoj kun marŝhandikapoj; la priskribo de la ekskurso kutime mencias tion.

## Ekskursaj kondiĉoj

Ĉar la ekskursoj dependas de minimumo da partoprenantoj, la organizantoj rezervas al si la rajton eventuale nuligi aŭ altigi la prezojn de iuj el ili. En tiuj okazoj ni klopodos averti vin kiel eble plej frue antaŭ la kongreso por ke eblu ŝanĝi aŭ nuligi la ekskurso(j)n.

## Limdatoj

La limdato por fari mendojn estas la 15-a de majo 2019. Mendojn post tiu dato oni plenumos nur escepte, ĝis la 1-a de junio, kaj nepre kontraŭ krompago (40 eŭroj por loĝado kaj antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj kaj 20 eŭroj por la ceteraj ekskursoj/bankedo). Eblas malmendi sen punpago nur ĝis la 1-a de majo 2019 tamen tio kostos al la malmendanto 15 eŭrojn pro administrado. Pri la ceteraj malmendaj reguloj konsultu la dorsflankon de la mendilo. La mendilon kaj pagon bv. sendi ĉiam al la sama adreso.

## Plenumo de mendoj

La mendojn oni traktos nur post la ricevo de la koncerna pago.

# Lingvaj kursoj

**Esperantaj kursoj**

Dum la UK okazos Esperantaj kursoj celitaj al komencantoj kaj por praktikado de la lingvo.



**Finna ekspres**

Kiel kutime, estos ankaŭ bazaj lecionoj pri la loka lingvo —la finna. La celo estas helpi babili pri simplaj ĉiutagaĵoj.

# Hoteloj

*Ĉiuj prezoj estas en eŭroj por unu persono por unu nokto; p.p. = por persono. IA = Isku Areena (la ĉefa kongresejo).*

## Ofertataj servoj

Se ne estas menciite alie, la hotelaj ĉambroj havas duŝejon, necesejon, senpagan retaliron, televidilon, telefonon kaj la matenmanĝo estas inkluzivigita en la prezo. La registriĝo okazas post la 15h00 kaj la forlaso de la ĉambro antaŭ la 12h00. Ekstraj servoj devas esti aranĝitaj surloke kaj pagitaj rekte al la hotelo.

## 1. Solo Sokos

▸ Aleksanterinkatu 14, FI-15110, Lahti, +358201234655, https://www.sokoshotels.fi/en/lahti/sokos-hotel-lahden-seurahuone (Distanco de IA: 1,2 km)

Luksa hotelo urbocentre, proksime de diversaj manĝejoj, aĉetcentroj, kafejoj kaj vendejoj. La hotelo havas normalajn kaj luksajn ĉambrojn. En la ĉambroj estas iloj por pretigi kafon kaj teon, harsekigilo, gladilo, klimatizilo. Sendrata interreto estas disponigata en la tuta konstruaĵo. Teretaĝe estas kafejo kaj restoracioj. La hotelo havas parkejon kaj saŭnon.

*Unupersona ĉambro: € 122; dupersona ĉambro: € 75 p.p.*

*Unupersona luksa ĉambro: € 155; dupersona luksa ĉambro: € 91 p.p.; tripersona luksa ĉambro: € 70 p.p.; kvarpersona luksa ĉambro: € 52 p.p.*

## 2. Mukkula Manor

▸ Ritaniemenkatu 10, FI-15240 Lahti (por korespondaĵoj: Niemenkatu 30), +358408284210, https://www.mukkulankartano.fi/en/home (Distanco de IA: 4,7 km)

Luksa hotelo ĉe lago je 10-minuta veturo aŭtomobile de la kongresejoj. La luksaj ĉambroj havas ĉiujn necesajn ilojn por komforta kaj ripoziga restado. La hotelo havas parkejon kaj saŭnon ĉe lago. (Bv. atenti ke la enregistriĝo okazas nur inter la 15h00 kaj 18h00.)

*Unupersona ĉambro: € 154; dupersona ĉambro: € 105 p.p.*

*Dupersona apartamento: € 159 p.p.; tripersona apartamento: € 105 p.p.*

## 3. Scandic Lahti City

▸ Kauppakatu 10, FI-15140 Lahti, +358300870881, https://www.scandichotels.com/hotels/finland/lahti/scandic-lahti-city (Distanco de IA: 1,6 km)

Komforta hotelo kun restoracio, kafejo, saŭno, parkejo kaj ampleksaj ĉambroj urbocentre. La ĉambroj havas harsekigilon, televidilon, labortablon kun seĝo kaj lignan plankon.

*Unupersona ĉambro: € 139; dupersona ĉambro: € 79 p.p.*

## 4. Scandic Lahti

▸ Vesijärvenkatu 1, FI-15100 Lahti, +35833393911, https://www.scandichotels.com/hotels/finland/lahti/scandic-lahti (Distanco de IA: 1,4 km)

Komforta hotelo ĉe la fervoja/busa stacidomo de Lahtio kun saŭno kaj naĝejo. La restoracio estas malfermita por vespermanĝoj. La ĉambroj havas harsekigilon, fridujeton, televidilon, labortablon kun seĝo kaj sendratan interreton.

*Unupersona ĉambro: € 134; dupersona ĉambro: € 79 p.p.*

## 5. Vierumäki Resort

▸ Kaskelantie 10, FI-19120 Vierumäki, +358105777012, https://vierumaki.fi/en/ (Distanco de IA: 27,4 km)

Komforta hotelo kun restoracio, saŭno, kegloludejo kaj dancejo, je 30-minuta aŭtomobila vojaĝo ĝis la kongresejoj. Modernaj ĉambroj klimatizataj, labortablo kun seĝo, gladilo kaj harsekigilo.

*Unupersona ĉambro: € 129; dupersona ĉambro: € 74 p.p.*

## 6. Manor Hotel Messilä

▸ Messiläntie 308, FI-15980 Messilä, +358386011, https://messila.fi/en/messilan-rinteet-2/majoitus (Distanco de IA: 7,4 km)

Bieno transformita en luksan hotelon kun restoracio kaj senpaga parkejo, 10 minutojn aŭtomobile for de la kongresejoj. Ĉambroj kaj en la ĉefa, moderna konstruaĵo kaj en la eksaj grenejoj/deponejoj. La naturo ĉirkaŭe estas ege bela kun aparta rigardo al lago.

*Unupersona ĉambro: € 119; dupersona ĉambro: € 71 p.p.*

*Unupersona ĉambro en "grenejo": € 128; dupersona ĉambro en "grenejo": € 75 p.p.; tripersona ĉambro en "grenejo": € 65 p.p.; kvarpersona ĉambro, "grenejo": € 59 p.p.; sespersona ĉambro, "grenejo": € 55 p.p.*

## 7. Hostel Hennala

▸ Kasarmikatu 9, rakennus/konstruaĵo 5, FI-15700 Lahti, +358442368418, https://experienceliving.com/en/ (Distanco de IA: 1,6 km)

La gastejo situas en komplekso de malnova kazerno en verda areo, malfermita al la publiko nur ekde 2014. La konstruaĵo havas komunajn kuirejon kaj necesejon/duŝejon, lignan plankon kaj estas facile konektebla kun la urbocentro per urbaj busoj. En la loko estas parkejo.

*Dupersona ĉambro: € 70 p.p.; tripersona ĉambro: € 58 p.p.; kvarpersona ĉambro: € 54 p.p.*

## 8. Pajulahti Olympic Center

▸ Pajulahdentie 167, FI-15560 Nastola, +3583885511, https://pajulahti.com/en/olympictrainingcenter/ (Distanco de IA: 19,7 km)

Olimpika centro en la apuda urbo Nastola. La ĉambroj estas komfortaj; la centro konstante ricevas internaciajn delegaciojn de sportistoj kaj estas konektebla kun Lahtio pere de buslinio 4 (Lahti-Nastola) ĝis Nastola. El Nastola eblas piediri 2,5 km ĝis la centro aŭ preni la buson 98 ĝis la hotelo. Aŭtomobile la veturo ĝis la kongresejoj daŭras ĉirkaŭ 20 minutojn.

*Unupersona ĉambro: € 107; dupersona ĉambro: € 39 p.p.*

***Per la reta mendilo viaj mendoj estas tuj traktataj. Krome vi povas realtempe sekvi, kiuj servoj restas disponeblaj.***




## 9. Forenom Aparthotel Lahti

▸ Rauhankatu 14, FI-15110 Lahti, +358201983420, https://www.forenom.com/fi/huoneistohotellit/lahti/forenom-aparthotel-lahti/136/ (Distanco de IA: 850 m)

La hotelo situas urbocentre, ĉe placo kie okazas la urba bazaro, proksime de restoracioj, kafejoj kaj vendejoj. En la ĉambroj estas i.a. mikroonda forno, akvoboligilo, manĝilaro, kafomaŝino, fridujeto, deterganto, polvosuĉilo, harsekigilo. Sendrata interreto. Proksime estas subtera parkejo, uzebla kontraŭ pago.

*Unupersona ĉambro: € 95; dupersona ĉambro: € 67 p.p.*

## 10. Kauppahotelli Grand

▸ Hämeenkatu 4, FI-15110 Lahti, +358354400, https://hotels.avainhotellit.fi/grand/ (Distanco de IA: 800 m)

Hotelo en trankvila flanka strato, proksime de la urbocentro, de kafejoj kaj manĝejoj. En la ĉambroj estas i.a. telefono, fridujeto, akvoboligilo, sendrata interreto.

*Unupersona komercista ĉambro: € 91.*

*Unupersona ĉambro: € 81; dupersona ĉambro: € 54 p.p.; tripersona ĉambro: € 46 p.p.*

*Kvarpersona familia ĉambro: € 38 p.p.*

## 11. Tallukka

▸ Tallukantie 1, FI-17200 Vääksy, +358388881, https://www.tallukka.fi/ (Distanco de IA: 23,5 km)

La hotelo situas meze de la naturo, inter du el la plej belaj lagoj de Finnlando. La hotela gimnastikejo, je 135 m super la marnivelo, havas privilegian vidon al la lagoj. La ĉambroj havas i.a. fridujeton, balkonon. La luksaj ĉambroj havas krome ĉambran robon kaj akvoboligilon. Senpaga uzo de la saŭno, naĝejo kaj gimnastikejo. Aŭtomobile de la hotelo al la kongresejoj estas ĉ. 25-minuta vojaĝo.

*Unupersona ĉambro: € 79; dupersona ĉambro: € 45 p.p.*

*Unupersona luksa ĉambro: € 105; dupersona luksa ĉambro: € 55 p.p.*

## 12. Amasloĝejo en Salpaus

▸ Lahti (Distanco de IA: ĉ. 450 m)

La amasloĝejo estos en konstruaĵo de la lernejo Salpaus, proksime de la kongresejoj. La decido pri la preciza konstruaĵo dependas de la kvanto de mendantoj kaj anonciĝos almenaŭ unu monaton antaŭ la UK. Oni devas mem kunporti dormosakon. Necesejoj en la sama konstruaĵo, la duŝejoj estas en apuda konstruaĵo. La matenmanĝo ne estas inkluzivigita.

*Loko surplanke: € 15 p.p.*




# Ekskursoj

Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj okazos en Finnlando kaj Sankt-Peterburgo.

La prezoj inkluzivas:

- restadon en komfortaj hoteloj kun matenmanĝo (aŭ en kajuto en A2)
- se indikite en la ekskursopriskribo, la tag- kaj vespermanĝojn
- se indikite en la ekskursopriskribo, la transporton per turismaj busoj
- Esperantajn interpretistojn.

La prezoj ne inkluzivas:

- trinkaĵojn dum la manĝoj
- ekstrajn elspezojn en la hoteloj kaj sur la krozoŝipoj, ekz. telefonvokojn
- ekstrajn programerojn dumekskursajn.

Se la sinsekvo de la ekskursoj ne povos okazi laŭ la priskribo, alternativoj estos proponataj. Pri la eventuala nuligo de programero(j) pro kialoj ekster la homa rego, ekz. katastrofo, UEA ne respondecos.

La partoprenantoj devas memstare atingi la lokojn de la komenco de la antaŭkongresaj ekskursoj kaj memstare vojaĝi al la (flug)haveno por foriri hejmen, fine de la postkongresaj ekskursoj.

La ĉiĉeronoj (lokaj esperantistoj) pretos helpi per sugestoj pri taŭgaj transportoj.

Ĉiu partoprenanto respondecas pri la informo al UEA de siaj nomoj kiel enskribitaj en la pasporto (oni povas esti rifuzita en la ekskursoj se la nomo sur la mendolisto ne kongruas kun tiu en la pasporto).

# Antaŭkongresaj ekskursoj



## A1 Helsinko, Baltmara perlo

▸ 16-a – 20-a julio, 5 tagoj / 4 noktoj

16.07 Alveno al Sokos Hotel Vaakuna (Asema-aukio 2). Je la 15h00 busa veturo al la malnova Helsinko por tie, piede, konatiĝi kun la golfo de la malnova urbo kaj kun la proksima natur-protekta areo. Dum la piedirado oni rakontos interesajn detalojn pri la urba historio. Vespermanĝo.

17.07 Matenmanĝo kaj ekiro, piede, al la proksima vendoplaco. Per pramŝipo al Suomenlinna, fortikaĵo kiu protektis la urbon, konstruita fine de la 18-a jc., en la listo de Unesko kiel Monda Heredaĵo. Vizito de ĝia muzeo. Reveno al la urbo kaj piediro ĝis la Placo de la Senato por ekstera konatiĝo kun la Katedralo, la Universitato kaj la Ŝtat-konsilio. Vespermanĝo.

18.07 Matenmanĝo. Busa rondveturo en Helsinko kaj en Espoo. Dum la vojaĝo ni vidos artajn muzeojn, la Nacian Muzeon, la Parlamentejon, la Finlandia-domon kaj la Operejon. Ni vizitos la Sibelius-monumenton. En Espoo, la dua plej granda urbo de la lando, post konatiĝo kun la plej interesaj lokaj vidindaĵoj estos libera tempo. Vespermanĝo.

19.07 Matenmanĝo. Piediro al la vaporŝipo J.L. Runeberg por krozado ĝis la mezepoka urbeto Porvoo. Lunĉo surŝipe. Piedira konatiĝo kun la urbeto. Busa reveno al la hotelo. Verspermanĝo.

20.07 Matenmanĝo kaj ekveturo al Lahtio. Alveno en Lahtio antaŭ la 12h00. La partoprenantoj estos lasitaj en siaj antaŭmenditaj loĝejoj. Fino de la servoj.

▸ Nepras bonaj promenŝuoj dumekskurse!

*Prezo de la ekskurso en unupersona ĉambro € 1070; dulita ĉambro € 790 p.p.*

*Por ekstraj noktoj, bv. kontakti la Kongresan Fakon de UEA.*

## A2 **Krozado al Sankt-Peterburgo** (kombinebla kun A1)

▸ 12-a – 14-a julio, 3 tagoj / 2 noktoj

12.07 La krozoŝipo M.S. Princess Anastasia ekveturas precize je la 18h00 el la terminalo Länsisatama (adreso: Tyynenmerenkatu 8, Länsiterminaali, Terminaali 1, 1-a etaĝo — bv. alveni al la haveno almenaŭ du horojn antaŭ la ekveturo!). Tranokto en la ŝipo.

13.07 Alveno al Sankt-Peterburgo je la 9h00. Ekveturo je la 10h30 por busa konatiĝo kun la ĉefaj vidindaĵoj de la urbo. Estos kelkaj haltoj por fotoj, sed ne estas planitaj eniroj en muzeoj. Lunĉo. La ŝipo ekveturos je la 19h00 por reveni al Helsinko. Tranokto en la ŝipo.

14.07 Alveno en Helsinko je la 8h00. Elŝipiĝo kaj fino de la servoj.

La partoprenantoj de tiu ĉi ekskurso ne bezonas vizon por Rusio (se el lando kun diplomatiaj rilatoj kun Rusio). La pasporto devas validi ankoraŭ 6 monatojn post la vojaĝo. Homoj, kiuj bezonas vizon por Finnlando/Schengen-landoj, devas havi plureniran vizon. La lunĉo estas inkluzivigita en la prezo. Aliaj manĝoj, trinkaĵoj kaj trinkmono ne estas inkluzivigitaj en la prezo. La kajutoj havas du ĝemelajn litojn.

*Prezo de la ekskurso en*
*unupersona kajuto kun fenestro € 665;*
*dupersona kajuto kun fenestro € 415 p.p.;*
*tripersona kajuto kun fenestro € 335 p.p.;*
*kvarlita kajuto kun fenestro € 295 p.p.*

*Prezo de la ekskurso en*
*unupersona kajuto sen fenestro € 555;*
*dupersona kajuto sen fenestro € 365 p.p.;*
*tripersona kajuto sen fenestro € 305 p.p.;*
*kvarlita kajuto sen fenestro € 255 p.p.*

*Por ekstraj noktoj, bv. kontakti la Kongresan Fakon de UEA.*



# Postkongresaj ekskursoj

## P1 Okcidenta Finnlando

▸ 27-a – 31-a julio, 5 tagoj / 4 noktoj

27.07 Ekveturo je la 13h30 al Lieto, komunumo 12 km for de Turku. Rigardo al la mezepoka preĝejo de Lieto kaj la centro de la municipo. Vespermanĝo en la bieno Nautelan Kartano kun vespera programo. Ekveturo al Turku, enhoteliĝo en Radisson SAS Marina, tranokto.

28.07 Matenmanĝo. Je la 11h30 piedira promeno al la Katedralo de Turku (1,4 km for de la hotelo). Ĉiĉeronata rondiro en Turku. Busa veturo al Tuorlan por viziti la Sciencan Centron kaj Planetarion, kie laboris konata esperantisto: Prof. Yrjö Väisälä; speciale por ni estos rondirado laŭ liaj spuroj. Vizito al la apuda bieno Tuorlan Majatalo. Reveno al Turku. Libera tempo. Piedira reveno al la hotelo kaj pluiro, post mallonga ripozo, al restoracio por vespermanĝo.

29.07 Matenmanĝo kaj busa veturo al Raŭmo, en la listo de Unesko kiel Monda Heredaĵo. Konatiĝo kun la malnova urbo kaj ĝia preĝejo. Lunĉo. Revene al Turku, halto en bierfarejo en la urbeto Laitila. Libera tempo kaj tranokto.

30.07 Matenmanĝo. Piede al la rivero Aurajoki por krozi ĝis la urbeto Naantali per la vaporŝipo S.S. Ukkopekka. Rondira konatiĝo kun la urbo. Libera tempo (sugesto: konatiĝi kun la fama Muminmondo de Naantali). Reveno al Turku per publika transporto proprakoste.

31.07 Matenmanĝo. Pieda promeno kun esperantistoj por plua konatiĝo kun Turku. Adiaŭa lunĉo kaj fino de la servoj.

▸ Turku havas flughavenon (TKU), havenon (ŝipoj al Stokholmo) kaj konekteblas kun la helsinka flughaveno per busoj.

*Prezo de la ekskurso en unupersona ĉambro € 1165; dulita ĉambro € 880 p.p.*

*Por ekstraj noktoj, kontaktu la Kongresan Fakon de UEA.*



# P2 Norda Finnlando — kie boacoj vagadas

▸ 27-a – 31-a julio, 4 tagoj / 4 noktoj



27.07 Ekveturo ĉirkaŭ la 22h00 de la lahtia stacio per nokta trajno al Rovaniemi, la ĉefurbo de Laponio kaj hejmo de la Julavo (trajna ŝanĝo en Helsinko).

28.07 Matena alveno en Rovaniemi, transporto al Original Sokos Hotel Vaakuna (Koskikatu 4). Enloĝiĝo. Lunĉo. Rondveturo por viziti i.a. la nordpolusan cirklon, provincan muzeon Arktikum. Estos tempo por memstare viziti la Julavan Vilaĝon. Vespermanĝo.

29.07 Matenmanĝo. Ekveturo al Posio, kie ni vizitos la Kulturan Centron de Pentik, kun ceramikejo, artgalerio, muzeo pri kafotasoj kaj vendejo. Ekveturo al la nacia parko Syöte. Lunĉo. Pluiro al la boaca bienego de Wirkkunen. Daŭrigo al la feriejo Saija en Taivalkoski. Enloĝiĝo kaj vespermanĝo.

30.07 Matenmanĝo kaj rondveturo en Taivalkoski por konatiĝi kun la urbo kaj kun la hejma muzeo kaj instituto de la fama verkisto Kalle Päätalo. Lunĉo. Vizito al la Arbaro Zamenhof. Filmo *Reveno al Finnlando*. Vespermanĝo.

31.07 Matenmanĝo. Busa veturo al Oulu, kie oni alvenos ĉirkaŭ la 12h00 kaj, laŭpete, oni povas esti transportita al la flughaveno (OUL). Lunĉo. Esploro de Oulu piede. Fino de la servoj.

▸ Al tiuj, kiuj restos en Oulu, loka esperantisto pretas montri la urbon, piede.

*Prezo de la ekskurso en unupersona ĉambro € 1090; dulita ĉambro € 935 p.p.*

*Por ekstraj noktoj, bv. kontakti la Kongresan Fakon de UEA.*

# Ekskursoj dum la kongresa semajno

## Tuttagaj ekskursoj

### E1 Helsinko

▸ Mardo kaj merkredo
8h30 – 17h30 Prezo: € 146

Busa veturo al la Sibelius-monumento kaj roka preĝejo, kiujn ni vizitos, en Helsinko. De tie la ekskurso daŭras piede, kun rakontoj kaj klarigoj de la gvidanto, laŭ la Parlamentejo, Nacia Muzeo, Muzikdomo, la ĵus inaŭgurita Oodi-Biblioteko, fervoja stacidomo kaj ĝia placo, Sanomatalo (ĉefurba gazeto), kvartalo el la 19-a jarcento, Universitata Biblioteko, Nacia Arkivo, Muzeo de la Finnlanda Banko, Placo de la Senato. Lunĉo. Daŭrigo buse por viziti la subĉielan muzeon Seurasaari. Busa revenvojaĝo al Lahtio.

### E2 Tampereo kun Muminoj

▸ Merkredo 10h00 – 19h30
Prezo: € 137

La unua halto estos en la bele konservita kampara vilaĝeto Hauho, kie ni vizitos la mezepokan preĝejon. Poste ni haltos en la vilaĝeto Vehoniemi por rapida vizito al ĝia Aŭtomobila Muzeo. Daŭrigo al Tampereo, kie ni lunĉos laŭ la menuo de Muminoj en la Tampere-halo kaj vizitos la Muzeon de Muminoj, la solan tiutipan muzeon en la mondo. Busa rondveturo en Tampereo kun halto ĉe la belvidejo Pyynikki, kie oni povas ĝui kafon kun dolĉa bakaĵo.

**! *Vi povas helpi plibonigi la kvaliton de la artaj aranĝoj per donaco al la Arta Kaso. Donacintoj ricevos apartan dankon en la Kongresa Libro.***


E2


E4

### E3 Artistoj kaj arkitekturo – Sibelius, Kokkonen kaj Aalto

▸ Merkredo kaj vendredo
9h00 – 17h00 Prezo: € 130

Busa veturo al la lago Tuusulanjärvi. Vizito de Ainola, elektita la Kultura Hejmo de la 20-a jc en Finnlando, hejma muzeo de Jean Sibelius (1865-1957), la plej konata finna komponisto. Vizito al Halosenniemi, hejmo/ateliero de Pekka Halonen (1865-1933), unu el la ĉefaj artistoj de la Ora Periodo de Pentrado en Finnlando. Lunĉo. Vizito de la artista domo Villa Kokkonen, kie la artistoj koncertos por ni. Alvar Aalto (1898-1976) estis la arkitekto kiu projektis la domon por la komponisto Joonas Kokkonen (1921-1996).







## E4 Du subĉielaj akvovojoj – Vääksy kaj Kalkkinen

▸ Merkredo kaj vendredo
9h00 – 17h00 Prezo: € 116

Busa veturo al Asikkala por viziti la lokan muzeon Päijänne pri fiŝkaptado, kie ni konatiĝos kun tiu aktivaĵo. Libera tempo por aprezi la naturon. En Vääksy ni prenas la ŝipon por krozi ĝis la vilaĝo Kalkkinen laŭ la kanaloj de Vääksy kaj Kalkkinen. Lunĉo surŝipe. Vizito de la bieno Viini- & Puutarhatila Pihamaa por konatiĝi kun la ĝardeno, vin- kaj bierfarejoj kaj por gustumado. Konatiĝo kun la ĉarma preĝejeto en Kalkkinen. Reen al Vääksy sur la terkresto Pulkkilanharju, 8 km longa, meze de la lago Päijänne. La gvidantoj rakontos pri la plej uzata akvovojo por libertempa boatado en Finnlando. Vizito de la loka malnova muelejo.

## E5 Kinnari, Kiikunlähde, Hollola, Koiskala

▸ Lundo kaj merkredo
9h00 – 16h15 Prezo: € 86

Busa veturo al la farmobieno Kinnari, apartenanta al la sama familio ekde la jaro 1667. Konatiĝo kun la biena vivo. Pluiro al la naturfonto Kiikunlähde, la plej granda de Finnlando (400 m longa x 100 m larĝa). Ĝia turkiskolora akvo estas belega fenomeno. Veturo al Hollola por konatiĝi kun la mezepoka preĝejo kaj la artgalerio de la artistino Asta Pulkkinen, kiu specialiĝis pri la naivstilo. Apude troviĝas butiko kun hejmfaritaj tekstilaĵoj. Ekveturo al la bienego Koiskala laŭ lagborda vojo. Lunĉo el naturaj produktoj. La bieno funkcias laŭ la koncepto de ekologia agrikulturo, koncepto kun kiu ni konatiĝos.

## E6 Heinola kun krozado

▸ Merkredo kaj ĵaŭdo
10h00 – 19h00 Prezo: € 133

Busa veturo al la bieno Koira Kikka, kie ni konatiĝos i.a. kun boacoj kaj sledhundoj. En la urbo Heinola ni vizitos la birdoĝardenon, flegejon por vunditaj sovaĝaj birdoj kiuj estas, post la resaniĝo, reenkondukataj en la naturon. Lunĉo. Krozado al Lahtio laŭ la kanaloj Kalkkinen kaj Vääksy. La ekskurso finiĝas en la haveno de Lahtio, de tie poste ni memstare revenos al la hoteloj/kongresejo.

# Ekskursoj dum la kongresa semajno

## Duontagaj ekskursoj



### D1 **Lahtio per buso**

▸ Sabato, dimanĉo, lundo
14h00 – 16h00 Prezo: € 29

La plej komforta maniero konatiĝi kun la urbo. Ni rigardos la ĉefajn vidindaĵojn, ekz-e la urbodomon, vendoplacon, bibliotekon, teatron, Ristinkirkko-n (Preĝejon de la Kruco), Sibelius-domon (la modernan koncertejon de Lahtio), la havenan areon kaj lagobordon de Vesijärvi.

### D2 **Natura Lahtio** (piede)

▸ Lundo kaj mardo
9h00 – 12h00 Prezo: € 18

Per tiu ĉi ekskurso ni konatiĝos kun la bela naturo de la urbo: unue kun la lageto Pikku-Vesijärvi kaj ĝia akvoorgeno, poste kun la havena areo, la parko Lanupuisto kun la imponaj betonaj verkoj de la skulptisto Olavi Lanu, galerio Pro-puu kaj kun la ekstera flanko de la Sibelius-domo.

### D3 **Rakontoj pri Lahtio plus urbodomo**

▸ Mardo kaj ĵaŭdo
9h00 – 12h00 Prezo: € 13

El la kongresejo ni piediros ĝis la urbodomo. Survoje oni rakontos la historion de Lahtio. Vizito de la urbodomo.

### D4 **Radiomastoj kaj muzeo** (piede)

▸ Dimanĉo 13h00 – 16h00
Prezo: € 24



Piedira promeno ĝis la radia kaj televida muzeo Mastola, situanta sur monteto. Survoje kaj en la muzeo la gvidantoj rakontos interesajn okazaĵojn pri la urbo kaj muzeo. La vizito en la muzeo estas inkluzivigita en la ekskurso.



### D5 **Odo al ligno — Sibelius-domo kaj haveno**

▸ Ĵaŭdo
13h00 – 16h00 Prezo: € 28

La piedira ekskurso iros de la kongresejo ĝis la haveno tra la urbaj parkoj, inkluzive de la Parko de Ligna Arkitekturo, kie staras konstruaĵoj de diversaj arkitektoj. Vizito de la Sibelius-domo, la renoma urba koncertejo de Lahtio. Ĝia impona ligna internaĵo estas ekzemplo de la tipe finna arkitekturo.

## D6 Panoramo el la skisaltejo

▸ Mardo kaj ĵaŭdo
14h00 – 17h00 Prezo: € 23

El la kongresejo ni piediros al la apudaj skisaltejoj por ĝui la plej belan vidon al la urbo kaj regiono el la plej alta el la platformoj. Poste ni promenos en la apuda arbaro. Limigitaj lokoj!



## D7 Saŭna vespero

▸ Merkredo
18h00 – 21h00 Prezo: € 125

Kiu estas la plej tipa finna sperto? Saŭnumado, kompreneble! Por sperti ĝin — kun ĉiuj detaloj kaj klarigoj rakontataj de saŭnomastrino, kosmetikaj vizaĝomaskoj el torfo, betulfaskoj, ŝampuoj, sapoj, memoraĵetoj— tiu ĉi ekskurso estas la plej taŭga maniero. Sekvos vespermanĝo kun kradrostitaj viandoj kaj vegetaĵoj. La prezo inkluzivas la transporton, saŭnumadon, kosmetikaĵojn, bantukon, du trinkaĵojn dum la saŭnumado, bufedan manĝaĵon. Aliajn trinkaĵojn oni devas surloke mem pagi. Nepre kunporti naĝkostumon.

## D8 Subĉiela dancovespero

▸ Ĵaŭdo
20h00 – 24h00 Prezo: € 35

Busa veturo al Jenkkapirtti por dancovespero laŭ la ritmo de ŝlagroj (furoraj kanzonoj). Jen okazo por amuziĝi kun la ne e-istaj lokuloj kaj reklami nian lingvon. Manĝaĵoj kaj trinkaĵoj surloke mendeblaj.

## D9 Kantelkoncerto ĉe Timo Väänänen

▸ Merkredo kaj ĵaŭdo
17h00 – 20h00 Prezo: € 40



La e-ista kantelisto Timo Väänänen malfermas sian hejmon por rakonti la historion de kantelo, tipe fina muzikinstrumento. Li ludos kelkajn el siaj multaj instrumentoj. La varia kaj bongusta vespermanĝo estos kuirita de li mem. ▸

▸ Tiel unika vespero maloftas dum Universajal Kongresoj, do, nepre profitu la okazon! La piedirado ĝis lia hejmo longas 2 km (homoj kun marŝoproblemoj bv. preni taksion aŭ buson).

cezoj, pligrandigante nian konscion pri la neceso protekti la naturon kaj kiel ni povas tion fari. Poste ni vizitos la apudan naturprotektan sovaĝan arbaron Linnaistensuo.

## D10 Recikligo kaj naturprotektado

▸ Vendredo 13h00 – 16h30
Prezo: € 45

Busa veturo al la recikligejo Kujala. Temas pri loko, kie diversaj rubaĵoj estas reutiligataj laŭ la principoj de daŭripova evoluo. Ni konatiĝos kun la recikligaj pro-



▸ Nepre kunporti taŭgajn ŝuojn por la piediraj ekskursoj kaj mem taksi, ĉu vi havas la fizikan kapablon partopreni ilin, aparte tiujn, kiuj iras al arbaroj.

# Tabelo de dumkongresaj ekskursoj

| | Sab 20/7 | Dim 21/7 | Lun 22/7 | Mar 23/7 | Mer 24/7 | Ĵaŭ 25/7 | Ven 26/7 | Prezo EUR |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| E1 Helsinko | | | | T | T | | | 146 |
| E2 Tampereo kun Muminoj | | | | | T | | | 137 |
| E3 Artistoj kaj arkitekturo | | | | | T | | T | 130 |
| E4 Du subĉielaj akvovojoj | | | | | T | | T | 116 |
| E5 Kinnari, Kiikunlähde, Hollola | | | T | | T | | | 86 |
| E6 Heinola kun krozado | | | | | T | T | | 133 |
| D1 Lahtio per buso | P | P | P | | | | | 29 |
| D2 Natura Lahtio (piede) | | | M | M | | | | 18 |
| D3 Rakontoj pri Lahtio (piede) | | | | M | | M | | 13 |
| D4 Radiomastoj kaj muzeo (piede) | | P | | | | | | 24 |
| D5 Odo al ligno – Sibelius-domo | | | | | | P | | 28 |
| D6 Panoramo el la skisaltejo | | | | P | | P | | 23 |
| D7 Saŭna vespero | | | | | V | | | 125 |
| D8 Subĉiela dancovespero | | | | | | V | | 35 |
| D9 Kantelkoncerto | | | | | V | V | | 40 |
| D10 Recikligo kaj naturprotektado | | | | | | | P | 45 |

# Bankedo

La bankedo okazos la 22-an de julio je la 19h30
en Pelicans Lobby, 2-a etaĝo en Isku Areena.

**Enirplado**
Legoma torto kun salato

**Supo**
Terpira supo kun fritítaj panpecoj

**Ĉefplado**
Bova fileo, terpoma kaĉo, kradrostitaj legomoj

*Vegetare: vegetaraj rulaĵoj kun freŝaj ruĝaj vakcinioj, terpoma kaĉo, kradrostitaj legomoj*

**Deserto**
*Panna cotta* (kuirita laktokremo) kun mirteloj

**Trinkaĵoj**
Du glasoj da vino / persono, akvo, kafo kaj teo

Prezo: € 68



# Aranĝoj ĉirkaŭ la UK

**52-a Kongreso de ILEI**, 13-20 julio 2019 en Ĉaĉak, Serbio. Pliaj informoj: http://www.ilei.info/

**48-a Internacia Infana-adoleskula Kongreseto**, 20-27 julio 2019, Lahtio. Temo: "Mil kaj unu lagoj". Pliaj informoj kaj aliĝoj: http://bertosch.free.fr/iik2019/

**85-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj**, 20-27 julio 2019 en Lahtio.

**75-a Internacia Junulara Kongreso**, 28 julio – 4 aŭgusto 2019, Liptovský Hrádok, Slovakio. Pliaj informoj: https://ijk2019.tejo.org/

# Pliaj informoj

## Disdonado de reklamiloj, informiloj

UK estas la plej bona okazo por informi la movadan publikon pri nova iniciato, speciala agado de via faka asocio, reklami novan eldonaĵon, fari donacon al ĉiuj kongresanoj, anonci renkontiĝon, kurson, varon ktp. Plej efike estas meti la informilon en la dokumentujon kiun ricevas ĉiu kongresano. Tiu servo kostas € 275 kaj necesas peti permeson de la Estraro de UEA (bv. kontakti la CO); nenio rajtas esti distribuata kongreseje sen tiu permeso.

## Salonmendoj, standoj kaj budoj

Ĉiuj fakaj asocioj konataj al UEA ricevis mendilon pri salono por sia kunveno dum la UK. Salonmendoj devas atingi la Centran Oficejon ĝis la 31-a de marto de la kongresa jaro. Malfruajn mendojn oni traktas malprioritate kaj eblas postuli por ili ekstran lupagon. Salonon por kunveno ne povas mendi individuo (ekz. por prelego), sed nur asocioj. Se via asocio ne ricevis la mendilon, bv. peti ĝin ĉe la konstanta adreso. Asocioj, movadoj, firmaoj, eldonejoj, revuoj aŭ grupoj kiuj volas aparte informi, disdoni broŝurojn, kolekti kotizojn k.s., povas mendi standon aŭ lokon por instali sian budon dum la kongreso (€ 400). La budon oni ne rajtas uzi por komercaj celoj (vendado de libroj, insignoj k.s.), sed jes por kolekti mendojn.

## Kongresa Libroservo

Jen unika okazo aktualigi vian bibliotekon: en la Kongresa Libroservo multaj novaj libroj estos unuafoje lanĉitaj kaj plurajn titolojn eblos aĉeti kun speciala rabato. Ĝi havas ekskluzivan rajton vendi librojn kaj aliajn esperantaĵojn dum la UK.

Por vendigi viajn eldonaĵojn, necesas oferti ilin al la Libroservo de UEA (CO) minimume du monatojn antaŭ la UK.

## Pagmanieroj

Estas diversaj kontoj kaj manieroj per kiuj oni povas pagi siajn kongresajn mendojn. Elektu tiun kiu estas por vi la plej oportuna. Tamen bv. noti ke la plej sekura kaj rapida vojo estas banka monĝiro. Bv. konsideri malfermon de konstanta konto ĉe UEA, ĉar tio havas plurajn avantaĝojn. Bv. ĉiam sendi pagojn kaj rilatajn mendilojn al la sama instanco.

La pagojn por mendoj faru rekte laŭ unu el jenaj manieroj:

**Banko**. Per ĝiro al unu el jenaj kontoj, je la nomo de Universala Esperanto-Asocio:

• Nederlando: ABN AMRO-Bank, IBAN: NL86 ABNA 0426 9014 44 (BIC: ABNA-NL2A) aŭ ING Bank, IBAN: NL96 INGB 0000 6273 37 (BIC: INGBNL2A);

• Je la nomo de Universala Esperanto-Asocio al la konto en:

Belgio: Bpost Bank, IBAN: BE54 0001 6318 3197 (BIC: BPOTBEB1XXX)

Germanio: Postbank, IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09 (BIC: PBNKDEFF)

Svedio: Nordea, IBAN: SE95 9500 0099 6042 0074 3740 (BIC: NDEASESS)

Svislando: Postfinance, IBAN: CH86 0900 0000 1200 2310 0 (BIC: POFICHBEXXX).

Ĉe eventualaj administraj bankokostoj, ilin ĉiam pagas la mendanto.

**Ĉekoj**. Bankan ĉekon bv. sendi al la konstanta adreso. Ĝi estu en eŭroj kaj ne-pre aldonu 25 eŭrojn por la banko-kostoj. Prefere sendu ĉekojn titolitajn al unu el la bankoj en Nederlando. Ĉiam bv. klare indiki la celon de via pago. Bv. atenti ke la bankoj en Nederlando bezonas kelkajn semajnojn por trakti la ĉekojn kaj krediti la respektivajn sumojn al UEA.

**Kreditkartoj**. Eblas pagi ankaŭ per Visa, Eurocard, Mastercard kaj American Express, indikante la kartonumeron, ĝian validodaton kaj la 3 kontrolciferojn malantaŭe sur la kartoj (CVC-numero). Tiukaze bv. aldoni 5% al la pagata sumo por administraj kostoj. Por grandaj sumoj estas konsilinde uzi alian pagmanieron.

**Paypal**. Eblas pagi pere de Paypal uzante la adreson financoj@co.uea.org. Bv. aldoni 5% al la pagata sumo pro administraj kostoj.

## Asekuro

La kongreskotizo inkluzivas nenian asekuron: ĉiu aliĝinto zorgu mem pri taŭga vojaĝasekuro. La UK ne repagas mendojn (loĝado, ekskursoj k.a.) se la malmendo venas post la limdato. Tial estas konsilinde asekuri sin kontraŭ eventuala nepartopreno.

## Donacoj

La UK bonvenigas donacojn por:

• Adoptaj Gepatroj: subvencias partoprenon en la Infana Kongreseto de infanoj el landoj kun transpagaj problemoj.

• Fondaĵo Canuto: helpas membrigon al UEA de esperantistoj el landoj kun transpagaj problemoj.

• Fondaĵo Partoprenu UK-on: helpas al kongresanoj el triamondaj landoj.

• Blindula Kaso: helpas al blindaj kongresanoj.

• Volontula Fondaĵo: subtenas volontulan servon ĉe la Centra Oficejo.

• Ĝenerala Kaso: por la ĝenerala subteno al la organizado de la UK.

• Arta Kaso: helpas financi artistojn por prezentiĝo dum la Universalaj Kongresoj.

Mencio pri ĉiu donacinto aperos en la Kongresa Libro kaj en la revuo *Esperanto*.

# Kontaktinformoj

Centra Oficejo de UEA, Kongresa Fako (bv. skribi nur al la Kongresa Fako, ne al LKK): Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel. +31 (0)10 436 1044, fakso: +31 (0)10 436 1751; retadreso: kongresoj@co.uea.org

# Speciala oferto de la Libroservo

Se vi partoprenos la ĉi-jaran UK, vi povas mendi ion ajn en la stoko de la Libroservo de UEA, kontraŭ kongresa prezo kaj sen sendokostoj. La menditaĵojn vi prenos en la Kongresa Libroservo, kie vi povos ankaŭ pagi por ili, se en via UEA-konto ne estis sufiĉa bonhavo. Por ĝui la oferton, via mendo devas atingi la Libroservon de UEA antaŭ la mezo de majo.

Ne hezitu viziti nian retan katalogon kaj mendi tie: http://katalogo.uea.org

Mendojn oni akceptas ankaŭ per simpla mesaĝo al libroservo@co.uea.org, fakse (+31 10 436 1751), telefone (+31 10 436 1044) aŭ letere (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando). Nepre indiku vian UEA-kodon en la mendo.



# Kongresaj perantoj

Se en via lando estas peranto, prefere sendu viajn mendilon kaj pagon al tiu. Se ne, bv. sendi la mendilon kaj pagon al Roterdamo. Mendojn sen pago oni ne traktos.

| | |
|---|---|
| Aŭstrio | Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg |
| Belgio | Claude Glady, 1 rue du Culot, 5630 Cerfontaine |
| | *aŭ* Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstr. 169, 2060 Antwerpen |
| Britio | Esperanto-Asocio de Britio, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE |
| Ĉeĥio | Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p/a Petro Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice |
| Ĉinio | Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 825, 100037 Beijing |
| | *aŭ* Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro Ora Ponto, Shijieyu Zhongxin, Jingchuan-Xian, 744300 Pingliang |
| Danio | Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4.tv., 2100 København |
| Estonio | Ahto Siimson, Rüssa tee 2, Liu, 88302 Audru vald, Pärnumaa |
| Finnlando | Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki |
| Francio | Esperanto-France, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris |
| Germanio | Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger Str. 9, 55129 Mainz |
| Hispanio | Pedro A. Garrote Escribano, C/ Las Mercedes 5-5º-C, 47006 Valladolid |
| | *aŭ* Kataluna Esperanto-Asocio, Hotel d'Entitats Can Guardiola, carrer Cuba 2, 08030 Barcelona |
| Hungario | Hungaria Esperanto-Asocio, Pf. 193, 1368 Budapest |
| Israelo | Jehoŝua Tilleman, 97-a Dereĥ-Akko, 2637324 Kirjat-Mockin |
| Italio | Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, 20143 Milano |
| Japanio | Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, 162-0042 Tôkyô |
| Kanado | Kanada Esperanto-Asocio, 2101-400 Walmer Rd, York ON, M5P 2X7 |
| Korea Resp. | Korea Esperanto-Asocio, 1601 Gangbyeon Hansin Core, 18 Mapo-daero 4da-gil, Mapo-gu, Seoul, 04177 |
| Kroatio | Davor Klobučar, Huttlerova 27 A, 31000 Osijek |
| Latvio | Margarita Želve, Rūpniecības iela 35-13, Rīga 1045 |
| Litovio | Litova Esperanto-Asocio, ab.k. 167, 44002 Kaunas C |
| Nederlando | UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam |
| Norvegio | Agnar Fitjar, Wiers Jenssens vei 33A, 5089 Bergen |
| Pollando | Jan Skonieczka, ul. Chłodna 23ª, 85-345 Bydgoszcz |
| Portugalio | Portugala Esperanto-Asocio, Praceta Humberto Delgado, 1 - B, Monte Abraão, 2745-318 Queluz SNT |
| Rusio | Halina Gorecka, ab.ja. 1205, 236039 Kaliningrad |
| Slovakio | Ľubomír Fajth, Prosné 161, 01 801 Udiča |
| Svedio | Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, LGH 1303, 931 38 Skellefteå |
| Svislando | Konto CH86 0900 0000 1200 2310 0 je la nomo "Universala Esperanto-Asocio" |
| Usono | Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103 |

## Ziko Marcus Sikosek

# Sed homoj kun homoj

**Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005**

**Lige kun la centjariĝo de la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj okaze de la 90-a UK en Vilno (2005), UEA eldonis historian libron pritraktantan la plej grandan kaj gravan regulan eventon en la Esperanta movado.**




**Abunde ilustrita kaj informa verko, havinda por ĉiu kiu interesiĝas pri la historio de Universalaj Kongresoj.**

Bindita € 18,00, broŝurita € 12,00. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.